der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

17. Jahrgang Nr. 105 (1/1981) ISSN 001 4-0619 30 Pf

LA INTERNACIA KOMUNIKADO KAJ LA JUNULARO

Intervjuo kun Ernesto Ottone FERNANDEZ, prezidanto de Monda Federacio de Demokrata Junularo

Lastatempe plivigliĝis la kontaktoj inter la Monda Federacio de Demokratia Junularo kaj la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Por plifortigi tiun kunlaboron ni petis intervjuon de kamarado Ernesto *OTTONE FERNANDEZ*, prezidanto de MFDJ.

La nun 30-jara ĉilia komunisto instruis sociajn sciencojn en unu el la universitatoj de sia lando. En MFDJ li komencis labori en 1973. Rezulte de lia elstara agado, la asembleo de MFDJ elektis lin prezidanto en 1978. K-do *OTTONE* akceptis min en la budapeŝta sidejo de MFDJ. Nian konversacion ĉeestis ankaŭ Enrique *DRATMAN*, argentina vicprezidanto de MFDJ, kaj András *SIMONYI*, estro de la ĉefsekretariejo de MFDJ.

Laŭ mia peto, k-do *OTTONE* unue informis min pri la eksterordinare komplika kaj multflanka agado de MFDJ. Pli ol 280 junularaj organizoj — entute kun pli ol cent milionoj da membroj — el 108 landoj apartenas al la Monda Federacio. Tiuj ĉi organizoj, kvankam reprezentantaj diversajn politikajn kaj sociajn movadojn, pere de MFDJ unuigas siajn fortojn por servi al la interesoj de la junularo kaj al la afero de la paco kaj progreso.

MFDJ ĉiam aŭdigas sian voĉon koncerne la plej gravajn mondeventojn. Kiam eblas, ĝi iniciatas la solvadon de la problemoj kaj per proponoj kaj per agoj. Por ekzemplo en la venko de la nikaragva revolucio gravan rolon ludis la solidareco de la demokratia junularo. Antaŭ nelonge MFDJ okazigis en Kolumbio internacian konferencon pri la luktado de la latinamerika junularo por demokrataj rajtoj. MFDJ ankaŭ en Ĉilio iniciatis malpli larĝan internacian konferencon pri la homaj rajtoj. (La konferencon oni sukcesis okazigi malgraŭ tio, ke la faŝisma registaro malpermesis ĝin kaj eligis el la lando la delegitaron de MFDJ.) Por apogi la liberecbatalon de la sud-afrika popolo MFDJ organizis en Parizo, kunlabore kun UNESKO, internacian solidarecan konferencon; en Hajderabado (Hindio) renkontiĝon por solidariĝi kun Vjetnamio; en Sieraleono, konsultiĝon pri la nova internacia ekonomia ordo kaj ekonomia situacio de afrikaj landoj.

Delegitaroj de MFDJ vizitis eĉ Sud-Libanon, kie ĝi diskutis kun Jaser *ARAFAT* la detalojn de la kampanjo de solidareco kun la palestina popolo. La konsultiĝon de eŭropaj junularaj organizoj, okazintan ĉe la lago Balatono (Hungario), partoprenis reprezentantoj de la plej diversaj politikaj movadoj. Kaj ĉio ĉi tute ne estas kompleta listigo de nia pasintjara agado — diris la prezidanto de MFDJ.

— *Dum tiom multflanka internacia agado verŝajne ofte prezentiĝas lingvaj malfaciloj. Kiel vi taksas la lingvajn problemojn de MFDJ?*

„Ni renkontas certajn lingvajn malfacilojn. En MFDJ estas uzataj tri oficialaj lingvoj: la angla, la franca kaj la hispana. Tiamaniere ni ebligas por pli da homoj paroli sian gepatran lingvon aŭ uzi ilin kiel perilojn. Kompreneble, la scipovo de unu komuna lingvo ĉiam estas granda avantaĝo. Tion mi mem spertis en Latin-Ameriko, kie oni ofte okazigas altkvalitajn internaciajn konferencojn sen interpretado. Sur aliaj kontinentoj tio estas multe pli malfacila.

Tamen mi devas konstati, ke ne la lingva problemo estas la plej grava por MFDJ; ni havas politikajn problemojn multe pli malfacilajn. Sed la lingva problemo ekzistas; kaj foje-foje ĝi malhelpas la internacian komunikadon, la reciprokan interkompreniĝon."

El la buĝeto de MFDJ kiom granda kvoto estas elspezata pro tradukado, interpretado, kaj pro aliaj kostoj ligitaj kun la multlingveco?

„Ni ne disponas precizajn kalkulojn, sed ni scias, ke granda parto de nia buĝeto estas uzata por forigi la lingvajn barojn."

Vi ĵus diris, ke ekzistas problemoj pli gravaj ol la lingvaj. Tio estas evidenta. Tamen demandiĝas, ĉu la lingva problemo ne influas la solvadon de la aliaj gravaj taskoj?

„— Nature, ke ĝi havas tian influon. La lingva problemo estas unu el la plej grandaj malhelpoj al la interkompreniĝo de la gejunuloj de diversaj landoj, kaj tiamaniere ĝi fariĝas unu el la gravaj problemoj de nia epoko. Sed MFDJ laŭ sia specifeco okupiĝas unuavice pri aliaj taskoj: nome, la malarmado, la estigo de la nova internacia ekonomia ordo, la likvido de rasismo kaj ceteraj problemoj koncernantaj la junularon. Kompreneble tio ne signifas, ke ni ne deziras okupiĝi pri la lingvaj demandoj."

En la Statuto de MFDJ enestas, ke MFDJ zorge pristudas la problemojn de la junularo kaj strebas akiri amasan apogon por solvi tiujn ĉi problemojn. Ĉu vi jam provis, aŭ nun planas detale pristudi la lingvajn problemojn de la junularo?

„Ni mem ne faris tiaspecajn pristudojn, tamen interesataj en tia agado, ni deziras kontribui al la solvo de tiu ĉi problemo. Tiurilate nun pleje gravas, ke ni kunlaboras kun TEJO, kaj tion ni taksas ege pozitiva. La fakto, ke gejunuloj, kun malsimilaj gepatraj lingvoj amase lernas la saman komunan lingvon, kaj tiamaniere ili strebas pli bone interkompreniĝi kaj plilarĝigi sian horizonton—, estas demokratia procezo, komplete konformiĝanta al la celoj de MFDJ. Pro tio ni apogas la agadon de TEJO kaj la ideon de Esperanto. Sed — miaopinie — la lingva problemo estas tre kompleksa, al kies solvo kondukas pluraj vojoj.

Malgraŭ la fakto, ke nia programo ne enhavas la pristudon de la lingva problemo, ni strebas establi firmajn kontaktojn kun organizoj, pristudantaj ĉi problemon kaj serĉantaj la vojon por solvi ĝin. Tial ni evoluigas

niajn kontaktojn kun TEJO, kies agadon ni konsideras organa parto de la lukto por la demokratio, por la progreso, kaj por mondo pli bona".

En la Statuto kaj en la diversaj eldonaĵoj de MFDJ — unuavice en la revuo „World Youth" (Monda Junularo) — oni povas legi pri la konkretaj formoj de kunlaboro inter MFDJ kaj aliaj organizoj. Kiaj estas la formoj de kunlaboro inter MFDJ kaj TEJO?

„La celoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO estas grandparte la samaj. Ambaŭ organizoj luktas por la paco, por la sekureco, por la plifortigo de internacia kunlaboro, kaj por la rajtoj kaj pli bonaj vivkondiĉoj de la junularo. Konforme al tio, la delegitaro de MFDJ partoprenis la kongreson de TEJO en Nederlando (1979); kaj la delegitaro de TEJO la solidarecan konferencon en Parizo kaj la konsultiĝon ĉe Balatono. Ni regule informas unu la alian pri niaj agadoj, dezirante pluevoluigi niajn kontaktojn. Tiuaspekte ankaŭ estontece ni restos ege malfermaj, atendantaj la proponojn de TEJO por plua kunlaboro."

Ĉu vi konsideras, ke estas dezirata tiaspeca kunlaboro ankaŭ inter la membro-organizoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO?

„Nepre necesas, ke tiu kunlaboro ekzistu ne nur sur la nivelo de la internacia estraro, sed ankaŭ la unuopaj naciaj junularaj organizoj daŭre kunlaboru kun la lokaj organizoj de TEJO. Ĝenerale estas nia principo, ke la naciaj membro-organizoj de MFDJ — surbaze de siaj memstareco kaj sendependeco — serĉu la kontaktojn kun la naciaj membro-organizoj de ĉiuj internaciaj organizoj, kun kiuj ankaŭ la centra oficejo de MFDJ kunlaboras.

La lingva problemo koncernas larĝajn tavolojn de la junularo. Ĉi problemo kaŭzas multajn malfacilojn por la gejunuloj en la lernado, en la laborado kaj dum internaciaj renkontiĝoj — ĝenerale en la lukto por la komunaj celoj. Pro tio estas gravege, ĝuste por la junularo, ke ni sukcesu forigi la lingvajn barojn de la internacia komunikado."

Fine, estus interese scii, ĉu en la sidejo de MFDJ troviĝas gejunuloj, kiuj serioze okupiĝas pri la lingva problemo kaj speciale pri Esperanto?

„Tio eblas. El la karaktero de nia agado sekvas, ke ni havas junajn kunlaborantojn el ĉiuj mondpartoj, kaj ili ne laboras longe ĉi tie, ĉiam venas aliaj por ilia anstataŭo. Mi nepre informiĝos, ĉu laboras ĉe ni iu, kiu interesiĝas pri tiu vere gravega problemo. Se ni trovos gejunulojn, interesiĝantaj pri lingvistiko aŭ pri Esperanto, tiam ni nepre informos pri tio la esperantistojn. Ni esperas, ke ankaŭ tiamaniere ni sukcesos plifortigi niajn kontaktojn."

(Budapeŝta Informilo 4/1980)
András LUKÁCS

Kibernetikistoj akceptis Esperanton

La IXa Internacia Kongreso pri Kibernetiko, okazinta de 8a ĝis 13a de septembro en Namur/Belgio, akceptis kiel kongreslingvon krom la francan kaj la anglan — unuafcje kiel trian Esperanton. Ĉirkaŭ kvarono de la kongresprelegoj okazis en Esperanto. La membro-kunveno de la Internacia Kibernetika Asocio sen kontraŭvoĉo rekomendis Esperanton kiel samrangan trian laborlingvon kaj por la kongreslibro ankaŭ por la Xa Kongreso de 1982.

Gravega paŝo antaŭen

Pri la dua interlingvistika seminario kun GDR-sciencistoj

En sia artikolo „Kial Esperanto ne interesas lingvo-sciencistojn“ („Esperanto“ 2/1980) la juna hinda lingvisto kaj esperantisto d-ro Propal Daŝgupta asertas, kiel jam montras la titolo de lia artikolo, ke lingvosciencistoj ignoras Esperanton. Li listigas kelkajn nekonvinkajn kaŭzojn, entute nur rigardas la okcidentmondan lingvistaron kaj pruvas fakte nenion. En mia repliko, kiun publikigis la revuo „Esperanto“ en n-ro 4/1980, mi i. a. skribis „Daŝgupta neniel pruvis, ke „Esperanto ne interesas lingvistojn“, sed tion simple kaj tre kuraĝe asertas. Daŝgupta evidente eliras de sia scio (aŭ impresoj) pri la okcidenta lingvoscienco kaj tio estas tre unuflanka prezento. Almenaŭ mi mem en Germana Demokratia Respubliko tute ne spertis, ke la lingvistojn „Esperanto simple ne interesas“. Mi povus longe argumenti la kontraŭon, kaj tion povas ankaŭ la profesoroj Szerdahelyi, Isajev, Bociort kaj aliaj.

Kompreneble, dependas, *kiel* kaj *sub kiuj vidpunktoj* oni prezentas Esperanton al la lingvistoj.

Nu – la titole anoncita interlingvistika seminario en Ahrenshoop masive fundamentas la ĝustecon de mia repliko al Daŝgupta. Bedaŭrinde oni entute ne daŭrigis la diskuton pri la temo en la revuo de UEA.

Kio do okazis en Ahrenshoop? La Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio ĉe CLE jam 1979 invitis *profesiajn* lingvistojn (neesperantistajn!) de universitatoj kaj altlernejoj de GDR, de la Akademio kaj aliaj instancoj kaj prezentis al ili dum 4-taga seminario superrigardajn prelegojn pri problemoj de interlingvistiko kaj esperantologio. La sukceso estis grandega. Ni detale raportis pri tio en „der esperantist“ 3/79 (n-ro 95). Krome, kiel kutime ĉe gravaj sciencaj atingoj, ankaŭ „Budapeŝta Informilo“ donis lokon por raporto (en n-ro 6/79). Interese, ke la redaktoro de la UEA-revuo „Esperanto“ ne opiniis grava la temon kaj presis eĉ ne unu frazon pri la seminario. En GDR publikigis raporton la prestiĝa „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“ 4/1980 kaj la Scienca Revuo de la Universitato Halle 2/1980. Pri la problemoj de la sciencaj seminarioj oni ankaŭ komparu mian enkondukon en la antologio „La internacia lingvo: sciencaj aspektoj“ (Berlin 1979, p. 1 – 7).

Sed finfine pri la dua interlingvistika seminario mem: Ĝi estis je unu tago pli longa ol la lastjara kaj okazis de la 18a ĝis 22a de novembro 1980, denove en Ahrenshoop. Ankaŭ la preparo distingiĝis de la unua. Se lastjare

ni sendis invitleteron kaj 4-paĝan tezaron „Pri la signifo de interlingvistikaj esploroj“ al ĉiuj lingvosciencaj kaj fremdlingvoinstruaj sekcioj de ĉiuj altlernejoj de GDR, ni ĉijare dissendis la materialon (inkluzive de la prilaboritaj tezoj) al 90 elektitaj lingvosciencistoj de GDR. Necesas mencii, ke Kulturligo akiris la specialan permeson de la prorektoro por esplorado de Humboldt-Universitato, ke kiel kuninvitanto ankaŭ funkciu la konata lingvosciencisto prof. d-ro Georg F. Meier. Prof. Meier estas tre altreputacia lingvisto, estro de la katedro pri komunikada scienco, ĉefredaktoro de la supre menciita „Zeitschrift . . .“ kaj estas konata al absolute ĉiu lingvisto en GDR (kp. ankaŭ „der esperantist“ 4/1980 [n-ro 102], p. 78 kaj 5/1980 [103], p. 109). Jam pro tio la invitmaterialo jam havis certan efikon, eĉ se iuj invititoj entute ne reagis. De la 90 invititoj ĉirkaŭ 10 reagis tre afable kaj interesite, sed motivigis sian neĉeeston per oficaj aŭ personaj kaŭzoj. Subtrahante la membrojn de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio do ĉifoje partoprenis la seminarion entute 16 lingvistoj, el ili 12 kiel novuloj. Se 1979 nur ĉeestis du universitataj profesoroj, ĉijare venis 4. De la 23 partoprenintoj entute 17 estis doktoroj (inkluzive la 4 profesorojn), inter ili d-ro Spitz el ĈSSR.

Speciale grava estis la partopreno de la konata lingvisto prof. d-ro Wilhelm Schmidt el Potsdam, nacipremiito, membro de la Prezidio de la Scienca Konsilantaro por Lingvoscienco ĉe la Akademio kaj membro de la Akademio de Pedagogiaj Sciencoj. Prof. Schmidt havas fundamentajn meritojn en la konstruo de marksisma lingvoscienca teorio kaj de la germanistiko en GDR. Multaj elstaraj verkoj venas el lia plumo. Tre elokvente prof. Schmidt pledis dum la seminario por serioza instituciigo de interlingvistikaj-esperantologiaj esploradoj kaj instruado en GDR.

La seminarion ankaŭ distingis pli ampleksa temaro. Lastjare estis entute 12 prelegoj de 9 diversaj prelegintoj. Ĉifoje oni aŭskultis 18 prelegojn de 12 diversaj prelegintoj. Jen la listo (laŭ la sekvo de la prezento):

— „La internacia lingvo-situacio en la lumo de la planlingva demando“ (prof. d-ro Georg F. Meier, Humboldt-Universitato, Berlin)

— „Pri la problemaro de „mondlingvoj en la 20-a jarcento“, prof. d-ro Frank Häusler, Pedagogia Altlernejo Magdeburg)

— „Pri la rolo de la angla lingvo en la internacia komunikado, sub speciala konsidero de la scienc-teknika revolucio“ (asistanto Harald Hekker, Karl-Marx-Universitato Leipzig)

— „Postuloj pri kono de fremdaj lingvoj al inĝenieroj en socialisma entrepreno kaj en altlernejoj“ (d-ino Heidrun Krug, Teknika Altlernejo Leipzig)

- „Pri la problemaro de „facilaj“ kaj „malfacilaj“ lingvoj“ (Wolf Dietrich Wendt, altlerneja instruisto ĉe Humboldt-Universitato Berlin)
- „Scienca valoro de planlingvoj, kun aparta konsidero de Esperanto“ (d-ro Detlev Blanke, Kulturligo)
- „Rimarkoj pri lingvaj ordigo-sistemoj“ (doc. d-ro Otto Troebes, Martin-Luther-Universitato Halle)
- „Bahasa Indonesia – nacia planlingvo, Esperanto – internacia planlingvo“ (d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato Leipzig, ĉefasistanto)
- „Esperanto – aglutina planlingvo“ (Phdr. Erich Spitz CSc., ČSSR)
- „Pri la strukturo kaj evoluo de Esperanto“ (d-ro Detlev Blanke)
- „Planlingvoj – akustike“ (d-ro Detlev Blanke)
- „Esperanto – objekto kaj instrumento de komputiloj“ (d-ro Paul String, VEB Robotron Dresden)
- „Esperanto kaj datum-prilaborado“ (d-ro Martin Schüler, Centra Instituto por matematiko kaj mekaniko de la Akademio)
- „Esperanto – kiel literatura lingvo (d-ro Till Dahlenburg, fakinstruista konsilanto, Brüel)
- „Esperanto kiel objekto de instruado: internaciaj spertoj, eksperimentoj kaj problemoj“ (d-ro Till Dahlenburg)
- „Interlingvistiko en akademioj kaj altlernejoj – internacia situacio“ (d-ro Detlev Blanke)
- „Problemoj de la instituciigo de la interlingvistiko kaj esperantologio en GDR“ (prof. d-ro Georg F. Meier)

Krome: „Internacia planlingva komunikado – praktikaj impresoj“, kun diapozitivoj (d-ro Detlev Blanke)

Ankaŭ valoras mencii, ke dum la seminaria tempo estis ekspoziciitaj pli ol 100 fakverkoj pri la unuopaj temoj el la privata biblioteko de D. Blanke. Eĉ komence skeptikaj partoprenintoj ĉe la fino de la seminario verve engaĝis sin por la pritrakto de interlingvistikaj problemoj kaj por Esperanto. Oni tre konkrete diskutis pri la estonteco de Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj de GDR.

Kompreneble la gvidantaro de la seminario certigis, ke eĉ ne spuro de ne lerta kaj altruda propagando poresperanta povis ekesti. Tio certigis la seriozan kaj sobran, sekve aktivan kaj kreivan sciencan laboratmosferon. Neniu sentis sin primisiumita por la „venko“ kaj ĉiu mem, senaltrude, povis tiri siajn konkludojn, kompreneble favore al Esperanto.

Tiun spertoriĉan kaj rezultoplenan seminarion sekvos diversaj kolokvoj, prelegoj kaj diskutoj en diversaj altlernejoj kaj universitatoj de GDR pri apartaj temoj. La rezultojn oni prezentos en la kadro de la 3a interlingvistika seminario fine de 1981, denove en Ahrenshoop, loko ĉebaltmara, kiu jam fariĝis nocio.

Detlev Blanke

Internacia Junulara Esperantista Lernejo (IJEL)

De 3a ĝis 9a de novembro 1980 okazis en Germana Demokratia Respubliko seminariforma Internacia Junulara Esperantista Lernejo. Ĝin partoprenis 35 esperantistoj el ses landoj (GDR: 13, Hungario: 4, Rumanio: 1, Pollando: 4, ĈSSR: 8, Bulgario: 5), inter ili la ĉefe respondecaj aktivuloj pri junulara esperantista agado en la respektivaj landoj.

La ideo pri IJEL estiĝis en 1977a. Tiam oni okupiĝis unuafoje pri la ebleco kvalifiki la nunajn kaj ĉefe estontajn funkciulojn de junularaj Esperanto-organizoj en socialismaj landoj. Bazante sur la komunaj trajtoj de la socialismaj ŝtatoj kaj konsiderante la aktualajn politikajn necesojn la instruado de gejunuloj celu al pli bona socia, faka, movada kaj lingva klerecoj. La Konsultiĝo de socialismaj Esperanto-organizoj kaj aliaj renkontiĝoj plurfoje okupiĝis pri kadra programo por starigenda IJEL.

Unuaj promesplenaj klopodoj pri IJEL okazis 1977 kaj 1978 en Hungario kaj Pollando. La plej intensiva formo ĝis nun tamen realiĝis en Rathenow. Similaj seminarioj poste estu regule ripetotaj en aliaj landoj. Per tio la koncernaj E-asocioj strebas al edukado kaj kvalifikado de amplekse edukitaj, stabilaj kaj daŭre disponeblaj junaj gvidontoj.

La seminario komenciĝis per prelego pri problemoj de internacia kunlaboro inter la socialismaj junularaj organizoj. La prelegon prezentis reprezentanto de Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo (germ. mallongigo FDJ). Tiu aktiva partopreno de funkciulo de la socialisma junulara organizo de GDR substrekas la reciprokan intereson de FDJ kaj CLE pri la komunaj laborterenoj. Sekvis superrigardaj prezentaĵoj pri la Esperanto-movado ĝenerale, aparte pri UEA fare de d-ino F. Szabo-Felsö, kiu dum tiu tempo traveturis GDR-Berlinon kaj pro tio estis tuj petita de la organizintoj iom prelegi. Pri la ideologia strukturo de la Esperanto-movado prelegis J. Hamann kaj pri la specifaj trajtoj de la Esperanto-movado sub socialismaj kondiĉoj D. Blanke.

Aparte la junularan movadon traktis programeroj pri TEJO (M. Lennartz, kiu utiligis magnetofone registritajn paroladojn de S. MacGill kaj C. Lendvay) kaj raportoj pri strukturo kaj laboro de la unuopaj junularaj sekcioj (reprezentantoj de la koncernaj asocioj).

Referaĵoj pri kvalifikado de junuloj (O. Sittauerová), pri argumentado kaj informado pri Esperanto (J. Hamann) celis helpi la konkretan laboron en la grupoj kaj regionoj. Kulmina ero sendube estis renkontiĝo kun universitata profesoro, d-ro Georg F. Meier, unu el la plej konataj lingvistoj de GDR kun internacia reputacio,katedestro por komunikada scienco ĉe Humboldt-Universitato kaj ĉefredaktoro de lingvistika revuo. Profesoro Meier, ne estante mem esperantisto, ĉeestis la tutan seminarion, tre atente sekvis la senprobleman funkciadon de la internacia lingvo kaj fine, en la menciita renkontiĝo, komencis sian paroladon dum 10 minutoj en Esperanto. Poste li respondis ĉiutemajn demandojn pri lingvoj, tradukita de Detlev Blanke. Por multaj seminarianoj tio estis unika ebleco interparoli kun internacie fama sciencisto. Kompreneble dum la seminario (kaj ankaŭ post la kunsidoj) estiĝis multaj diskutoj, kiuj elstaris pro afereco kaj intereso. Plurfoje la gvidantoj devis interrompi la diskutadon, ĉar oni devis daŭrigi la programon aŭ manĝi.

Lasttage la kunsido temis pri la estonteco de la Esperanto-movado dum la venontaj jaroj, do ĝi similis al la seminario „Esperanto en la okdekaj

Esperanto-Bücher aus Ungarn 3

Vgl. die letzten Listen in „der esperantist“ 5/79 (97), S. 21, und 6/79 (98), S. 16. Sämtliche Titel können von DDR-Bürgern direkt beim Haus der Ungarischen Kultur, 1020 Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9, bestellt werden. (Es werden nur deutschsprachige Briefe bearbeitet.)

40. Gvidlibro por supera ekzameno. Red. A. Pechan. (Historio-Literaturo-Metodiko), 362 p., Budapest 1979, ISNB 963 571 0313
41. Baza Literatura Krestomatio. Red. V. Benczik, (Superrigardo pri la tuto de la Esperanto-literaturo per 124 specimenoj el la verkoj de 54 Esperantaj aŭtoroj) Budapest 1979, 266 p., ISBN 963 571 0445
42. Zs. Móricz: Ĉiela birdo. 44 p., Budapest 1979. Drama amrakonto, kies scenejo estas hungara vilaĝo komence de la 20a jarcento.
43. Steloj de Eger, Budapest 1980, 64 p. kun plurkolora kovrilo. Lerte desegnita bildrakonto, kiu verkiĝis laŭ eventoriĉa, atentokapta romano de Géza Gárdonyi (aŭtoro de „Sklavoj de Dio“, n-ro 1 de niaj listoj). La protagonisto de la historio estas juna knabo, fariĝanta unu el la plej elstaraj figuroj de la kontraŭturka rezistado en Hungario dum la 10a jarcento.
44. Balaton, poŝformata fotolibro pri la naturaj belaĵoj de la fama lago
45. Sciencaj komunikaĵoj 1977, 100 p., originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj
46. Sciencaj komunikaĵoj 1978, 100 p., originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj
47. Sciencaj komunikaĵoj 1979, 86 p., ilustrita, originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj
48. Sciencaj komunikaĵoj 1980, 100 p., originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj
49. Enciklopedio de Esperanto, 620 p., represo de la duvoluma verko el la jaroj 1933 — 34
50. K. Kalocsay: Kiel verki kaj traduki poemojn? Budapest 1980, 27 p.
51. A. Lienhardt, Amuzaj dialogoj, Budapest 1980 (2a eldono), 141 p. Utila lernilo por progresaj kursoj.
52. I. Szerdahelyi: Esperanto Internacia, 264 p., ilustrita nova eldono de internacie konata rektametoda lernolibro
53. I. Szerdahelyi: Esperanto 2, 232 p., ilustrita, daŭriga (al n-ro 52) kurslibro
54. Julio Baghy: Metodiko-demandaro. Esperantlingva klarigo de gramatikaj nocioj, 43 p.
55. Siklaky, J. / Ruisz, R.: A. vállalalatirányitási számitógép-alkalnuazás fogalmainak több nyelvü szótára, Budapest (Számitástechnikai Oktaté központ) 1972, Kvinlingva fakvortaro por aplikantoj de komputiloj (hungara, germana, angla, rusa, Esperanta)
56. Imre Madách: La tragedio de l'homo. Drama poemo en brila traduko de Kalocsay. 259 p.
57. B. Prus: La faraono. Bildstria versio. ISNB 963 571, 48 p.

Nutzen Sie die Gelegenheit, wertvolle Esperanto-Bücher zu erwerben!

(resto de paĝo 127)

jaroj“ de la pasinta IJK. Dum ĝi estas emfazata la socia integreco de la movado. En la prelego nomiĝis gravaj taskoj la laboro pri faka lingvo, laboro pri literatura lingvo por plialtigo de la traduka nivelo kaj la adapto de Esperanto al novaj sociaj bezonoj. La plej vigla diskuto de la seminario ekestis pri la kulturo aŭ nekulturo de Esperanto.

La teknikaj kaj organizaj kondiĉoj de ĉi-tiu aranĝo egalis al tiuj de similaj en GDR — do senkotiza partopreno, bonaj loĝejoj kaj manĝaĵoj. Menciindaj estas la disciplino de la seminarianoj, la alta nivelo kaj bona prepariteco de la prelegoj. Kiel kutime estis ofte uzata magnetofono — por muzikado, por prezento de kulturaĵoj kaj por kompletigo de la prelegoj. Resume kaj la organizintoj kaj la gastoj esprimis sian kontenton pri atingo de la starigita celo.

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado IV

(daŭrigo el „der esperantist“ 6/1980)

2.3. Ni sciu pri la temo! [23])

Informanto pri la internacia lingvo-problemo kaj Esperanto devas havi kompleksan kaj vastan scion pri la temo. Bedaŭrinde ne ĉiu konscias pri tio, ke tiu temo apartenas al la plej komplikaj kaj multfacetaj. Ne sufiĉas ion scii pri Esperanto mem kaj ĝia movado. Se oni volas sukcesi en diskuto, ekzemple kun kritikemaj kaj postulemaj scienculoj, studentoj aŭ aliaj intelektuloj oni devas havi superrigardon i. a. pri jenaj problemoj:

1) Problemoj de la internacia politiko, la rilatoj inter popoloj kaj ŝtatoj, la rolo de internaciaj organizaĵoj, la fenomeno de scienc-teknika revolucio k. t. p. Tre grava estas scio pri la „Fina Akto“ de Helsinki.

2) La ĝenerala lingvo-situacio de la mondo (iom da scio pri la ĉefaj lingvo-familioj kaj ties tutmonda disvastiĝo).

3) La historio kaj aktuala praktiko de la internacia lingva komunikado (i. a. la iama kaj nunaj roloj de la latina lingvo, la rolo de la grandaj internaciaj etnaj lingvoj kiel la angla, franca, rusa, hispana, germana en la diversaj aplikosferoj).

   Ĉi-tie gravas scio pri la diversaj aspektoj: la politika, ekonomia, jura, psikologia, soci-klasa, lingvistika kaj aliaj.

4) La konataj proponoj pri la raciigo, simpligo (aŭ optimumigo) de la internacia lingva komunikado (ekz. „revivigo de la latina, klopodoj pri unu aŭ du naciaj lingvoj, planlingvaj projektoj, maŝina tradukado, homa tradukado, instruado de fremdlingvoj).

5) Fontoj, strukturo kaj evoluo de Esperanto. Ĉi-tie ne nur gravas la scio pri la lingvo, kiel oni ĝin kutime trovas en lernolibroj kaj gramatikoj.

   Oni devas ion scii pri la lingvo el lingvoscienca vidpunkto.

6) La historio de la Esperanto-movado (burĝa kaj laborista).

7) La aplikateco de Esperanto en la plej diversaj sferoj.

8) La valoro de Esperanto por diversaj sciencoj (i. a. por lingvo-scienco, komputilo-scienco, metodiko de fremdlingva instruado, terminologio k. t. p.).

9) Bazaj konoj pri la sciencaj branĉoj interlingvistiko/esperantologio.

10) Opiniesprimoj de eminentaj pensuloj kaj sciencistoj pri a) la internacia lingvo-komunikado, b) la problemo de internacia lingvo kaj c) Esperanto.

11) Bazaj konoj kaj kapabloj en retoriko, psikologio kaj aliaj fakoj necesaj por publika prezentiĝo.

12) Metodoj de scio-akiro, scio-konservo, pretigo de prelegoj, k. t. p.

Kompreneble, oni povus kaj devus daŭrigi la liston, sed la listigitaj punktoj versâjne indikas la plej gravajn kompleksojn. Iom de superrigarda literaturo ni donas en la fontindikoj.

2.4. De kie la scio?

Necesas multaj penoj kaj streĉaj klopodoj por kolekti iom da materialo pri la sub 2.3. menciitaj kompleksoj. Ni donis elekton da utilaj kaj bone uzeblaj verkoj en fontindiko n-ro 23. Kiuj do estas la ĉefaj informfontoj?

Ni nomu la ĉefajn:

1) Faklibroj [24]), kiel ni multajn citis pri interlingvistiko kaj esperantologio. Pri ili informas la Esperanta gazetaro. Detalaj enhavtabeloj kaj indeksoj plifaciligas la uzon de la libroj.

2) La Esperanta gazetaro entenas multajn utilajn artikolojn[25]). Kelkaj revuoj plifaciligas la aliron per registroj. En „der esperantist", ekzemple, aperis en n-ro 45 (jan-febr 1971) alfabeta registro (temoj kaj aŭtoroj) pri ĉiuj kontribuoj de n-roj 1 (sept-okt 1965) ĝis 44 (nov-dec 1970). En n-ro 72 (4/1975) oni trovas krome superrigardon pri la plej gravaj artikoloj aperintaj en n-roj 1 — 67/68 (5-6/1974). Ankaŭ la UEA-revuo „Esperanto" disponigas jarajn indeksojn.

3) Tre grava materialo estas registrita en bibliotekaj katalogoj. Elstaras tiuj de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno[26]), de la universitata biblioteko en Amsterdam[27]) kaj de la universitata biblioteko en Torun[28]). Estus valore, se en ĉiu lando ekzistus Centra Katalogo pri la literaturo troviĝanta en la diversaj bibliotekoj pri Esperanto kaj la monda lingvo-problemo.

4) Superrigardaj verkoj tre ofte entenas detalojn bibliografiojn, kiuj citas verojn eble al la leganto ankoraŭ nekonatajn, kiujn li povus mendi pere de pli granda scienca biblioteko. Tre utilajn bibliografiojn verkis P. Stojan[29]), R. Haupenthal[30]) kaj H. Tonkin[31]).

5) Ankaŭ menciindas kiel certagrade faka revuo „Lingvo-problemoj kaj lingva planado"[32]), eldonata de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kaj la serio „Esperanto-dokumentoj"[33]) (en Esperanto, angla kaj franca lingvoj). Abundajn literaturindikojn oni trovas krome en nacilingvaj[34]) kaj en Esperantaj faklibroj[35]).

6) Multe da materialo oni ankaŭ trovas en nacilingvaj lingvistikaj revuoj kaj fakorganoj pri instruado de fremdaj lingvoj.

7) Serĉanto de literaturo pri difinita temo kutime utiligas la grandajn katalogojn de ŝtataj, universitataj, regionaj aŭ urbaj bibliotekoj. Tie troviĝas alfabetaj kaj sistemaj (pritemaj) katalogoj ebligantaj la trovon de baza materialo. Kutime en la sistema katalogo troviĝas subsekcio „artefaritaj lingvoj" aŭ „Esperanto", versâjne ĉe sekcio „Lingvoj: ceteraj lingvoj". Ankaŭ tre utila estas la katalogo de la gazetara literaturo, kie estas elĉerpataj laŭ temoj ĉiujare diversaj pli gravaj gazetoj kaj revuoj. La centra gazetara katalogo de GDR, troviĝanta en la sciencaj kaj grandaj urbaj bibliotekoj, por ĉiu jaro registras la plej gravajn artikolojn aperintajn en la nacia gazetaro ankaŭ pri Esperanto. Tre utilan superrigardan ver-

kon pri la tutmonda situacio de la Esperanto-literaturo en bibliotekoj kaj muzeoj preparis Marinko Ĝivoje.[36])

8) La moderna tekniko ebligas la aliron ankaŭ al prelegoj. Magnetofonbendaparatoj permesas la registradon de valoraj prelegoj, ĉu antaŭ aŭditorio ĉu en la radio. La fonetike konservita materialo, se indeksita, povas esti valora sciofonto. Sonbendaj servoj de UEA aŭ de la landaj asocioj helpos.

Cetere, estas granda eraro nur tiam ion aĉeti aŭ konservi se oni opinias ĝin bezonata. Povas esti momento, ke oni ion bezonus, kio ne plu estas aĉetebla. Pro tio serioza publika aganto por Esperanto ĉiam kolektas se troviĝas la okazo. Kaj fine, la plej grava fonto estas la praktikaj spertoj!

2.5. Konservi la scion

Ekzistas diversaj metodoj por sisteme konservi la kolektitan materialon. Ofte decidas pri elekto la individuaj kutimoj, preferoj kaj teknikaj eblecoj.

Tre konsilinda estas la instalo de kartoteko (kartaro). Sur la unuopaj kartoj oni notas bibliografiajn indikojn pri difinita temo, kopias iujn tekstopartojn, surgluas artikolojn aŭ simple metas malantaŭ la karton manuskripton, eltranĉitajn artikolojn aŭ aliajn dokumentojn.

Kutima estas alfabeta ordo. Pli facile uzebla estas tamen trukartoj, sur kiuj, laŭ certa sistemo, oni povos trusigni la ĉefajn informojn entenatajn sur la kartoj. Per specialaj stangetoj oni povas tre rapide trovi samtempe ĉiujn kartojn kun la difinita informo.

Tre grava, sed ofte forgesita, estas la skrupula registro de fontindikoj. Artikolo, citaĵo, tekstoparto sen detala kaj preciza fontoindiko estas senvalora.

Kolekto de sonbendoj, se eble, indeksitaj jarkolektoj de revuoj, diversaj dokumentujoj, diapozitivoj (por prelegoj) aŭ aliaj kolektoj kompletigas la arkivon de la specialisto. Ĉiu havas sian propran sistemon. Gravas, ke en ĝi regu granda ordo, ĉar nur tiam ĝi estas tuj kaj komplete uzebla.

Oni ne povas ĉion parkere scii. Ofte scii signifas, scii kie oni trovas la informon.

Notoj

[23]) 1. La manlibroj pri internacia politiko. Revuoj kiel en GDR ekzemple „Horizont", „Die Weltbühne", „Neue Zeit" (germanlingva eldono de soveta revuo) kp.
2. Superrigardojn pri la lingva situacio en la mondo i. a. donas:
   — Georg F. Meier/Barbara Meier: Handbuch der Linguistik und Kommunikationswissenschaft, Band I, Akademie-Verlag Berlin 1979
   — F. Bodmer: Die Sprachen der Welt, Köln 1958
3. Pri Eŭropa lingvosituacio:
   — G. Décsy: Die linguistische Struktur Europas, Wiesbaden 1973
   — H. Haarmann: Soziologie und Politik der Sprachen Europas, München 1975
4. Pri aspektoj de la lingvo-problemo, pri planlingvoj kaj pri interlingvistiko:
   — L. Couturat/L. Leau: Histoire de la langue universelle, Paris 1907
   — L. Couturat/L. Leau: Les novelles langues internationales, Paris 1907

Ambaŭ volumoj aperis en represo 1979 ĉe Olms-Verlag, Hildesheim
- E. Drezen: Historio de la mondolingvo, Leipzig 1931
- M. Pei: One language for the world, New York 1958
- P. Burney: Les langues internationales, Paris 1966
- A. Bausani: Geheim- und Universalsprachen, Stuttgart 1970
- T. Carlevaro/G. Lobin: Einführung in die Interlinguistik, Alsbach 1979
- D. Blanke: Zur wissenschaftlichen Beschäftigung mit Plansprachen I, „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung" Berlin, 2/1977, **parto II:** ZPSK 4/1977
- D. Blanke: Interlinguistik und interlinguistische Forschungen, en: **ZPSK** 6/1978

5. Pri la aplikateco de Esperanto:
   - I. Lapenna/U. Lins/T. Carlevaro: Esperanto en perspektivo, Rotterdam 1974
   - Enciklopedio de Esperanto, 2-a eldono, Budapest 1980
   - A. Pechan (Red.): Gvidlibro por supera ekzameno, Budapest 1979
6. Pri la lingvaj ecoj de Esperanto:
   - K. Kalocsay/G. Waringhien: Plena Gramatiko de Esperanto, Budapest 1935
   - J. Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, Rotterdam 1978
   - P. Janton: Einführung in die Esperantologie, Hildesheim 1978
7. Kolekto de studoj pri la sciencaj aspektoj de la monda lingvo-problemo kaj de Esperanto estas i. a:
   - Z. Tišlar (Red.): Internacia Lingvistika Simpozio, Zagreb 1976
   - M. Isajev (Red.): Problemy interlingvistiki, Moskva 1976
   - R. Haupenthal (Red.): Plansprachen, Darmstadt 1976
   - D. Blanke (Red.): Esperanto: Lingvo, movado, instruado Berlin (Kulturbund) 1977
   - D. Blanke (Red.): Socipolitikaj aspektoj de Esperanto, Budapest 1978
   - D. Blanke (Red.): La internacia lingvo: sciencaj aspektoj Berlin (Kulturbund) 1979
8. Eldirojn de eminentuloj pri Esperanto kolektis:
   - I. Dratwer: Pri internacia lingvo dum jarcentoj, Tel-Aviv 1977

[24]) Detalan bibliografion oni trovas en Blanke, cit. sub 23 4 — 7

[25]) Plej gravaj: Revuo „Esperanto", „Heroldo de Esperanto", „Hungara Vivo"

[26]) H. Steiner: Katalogo pri la Kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, 1—2. Wien 1957 — 1958

[27]) Catalogi Kunsttalen I + II, Esperanto, Amsterdam 1969

[28]) E. T. Wojtakowski: Decimala katalogo de la planlingva literaturo ĉe Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato en Lublino, Romo—Lublino 1979

[29]) P. Stojan: Bibliografio de Internacia Lingvo, Genève 1929, dua eldono, Hildesheim 1973

[30]) — R. Haupenthal: Enkonduko en la librosciencon de Esperanto, Nürnberg 1968
— R. Haupenthal: Auswahlbibliographie zur Interlinguistik, **en:** Plansprachen, Darmstadt 1976

[31]) H. Tonkin: Esperanto and international language problems: A research bibliography, Washington 1977

[32]) De 1969 — 1971 „La Monda Lingvo-Problemo" (n-roj 1 — 18), Den Haag, ekde 1972 „Lingvaj Problemoj kaj Lingvo Planado"

[33]) De „Esperanto-Dokumentoj" aperis jenaj titoloj:
1: UNESKO kaj UEA 1954 — 1974
2: La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco
3: Esperanto tra la etero, 1922 — 1975
4: Enkonduko al Esperanto-studoj
5: Universala Esperanto-Asocio en la Internacia Jaro de la Virino
6: Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto
7: Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto
8: La lingva problemo en la Eŭropa komunumo
9: Esperanto kaj la pliaĝuloj
10: Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?
11: La lingvo kaj la Rajto je komunikado
12: La uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvo-problemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: Kelkaj rekomendoj

Honorinsigno de CLE

Dum la elektokonferencoj de la Distriktaj Laborrondoj Esperanto en Kulturligo de GDR, okazintaj dum la lastaj monatoj, kelkaj aktivaj esperantistoj ricevis la Honorinsignon de CLE pro sia longdaŭra kulturpolitika kaj esperantista agado. Jen la distingitoj:

1. **Distrikto Dresden:** Werner Gafke, Hilde Reschke, Klaus Urban, Otto Leichert, Georg Liebscher (8. 11. 1980 en Riesa)
2. **Distrikto Erfurt:** Gerhard Hornbogen (7. 9. 1980 en Erfurt)
3. **Distrikto Gera:** Karl Raabe (4. 10. 1980 en Gera)
4. **Distrikto Halle:** Johannes Haupt (1. 11. 1980 en Halle)
5. **Distrikto Karl-Marx-Stadt:** Rolf Bethke, Wilfried Hofmann (11. 10. 1980 en Karl-Marx-Stadt)
6. **Distrikto Leipzig:** Max Nitschke, Ino Kolbe, Erich Rödel (13. 12. 1980 en Leipzig)
7. **Distrikto Potsdam:** Ernst Lindner (20. 9. 1980 en Potsdam)
8. **Distrikto Rostock:** Herta Rittner (DLE-kunveno 1. 11. 1980 en Stralsund)
9. **Distrikto Schwerin:** Hans Buth, Hans-Joachim Thormann, Ernst Diedrich (4. 10. 1980 en Schwerin)
10. **Distrikto Suhl:** Herbert Feid, Ingwart Ullrich (25. 10. 1980 en Suhl)

Ni kore gratulas al la distingitoj.

Veranstaltungen 1981

Bitte notieren Sie die Termine für folgende Seminare und Veranstaltungen:

1. 4. Treffen ehemaliger Arbeiter-Esperantisten vom 19. — 21. März 1981 in Eisenach
2. Beratung der Fachgruppe der Übersetzer am 11. April 1981 in Berlin
3. III. Zentrale Konferenz der Esperantisten im Kulturbund der DDR vom 22. bis 24. Mai 1981 in Karl-Marx-Stadt (nur für Delegierte)
4. Jugendtreffen vom 9 — 14. Mai 1981 in Phöben bei Werder/Potsdam (vermutlich als Intensivkurs)
5. 2. Internationales Ferientreffen auf dem internationalen Campingplatz „Intercamping Krossinsee" bei Berlin vom 14. — 26. 9. 1981
   Anmeldungen sind zu senden an: Bezirksarbeitskreis Esperanto Berlin im Kulturbund der DDR, 1020 Berlin, Breite Straße 35/36
6. 3. Wissenschaftliches Kolloquium zur Interlinguistik vom 11. — 15. Oktober 1981 in Ahrenshoop (interessierte Wissenschaftler sind von den Bezirksarbeitskreisen an den ZAK zu melden)
7. 15. Seminar für ehrenamtliche Leitungskader der Esperanto-Gruppen im Kulturbund der DDR vom 8. — 13. November 1981 in Lychen bei Neustrelitz
8. 10. Jugendseminar vom 25. — 29. November 1981 in Miersdorf bei Zeuthen (Berlin).

Für sämtliche Veranstaltungen, außer 3., 5. und 6., können ab sofort formlose Anmeldungen an den Zentralen Arbeitskreis gesandt werden.

---

[34]) ekz. — M. Pei: cit. loko, 23—4
— A. Bausani: cit. loko, 23—4
— E. Svadost: Kak vozniknjet vseobŝĉij jazyk? Moskva 1968
— I. Szerdahelyi: Bábeltöl a Világnyelvig, Budapest 1977

[35]) ekz. — I. Lapenna/U. Lins/T. Carlevaro: Esperanto en perspektivo, Rotterdam 1974
— J. Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, Rotterdam 1979

[36]) M. Ĝivoje en: D. Blanke (Red.) La internacia lingvo: sciencaj aspektoj, Berlin 1979

Linde Knöschke

Kelkaj pensoj pri la traduko de nacilingvaj specifaĵoj

La traduko de terminoj el nia socialisma ĉiutago kaŭzas multajn problemojn ne nur al esperantistoj sed ĝenerale al tradukistoj. Fakuloj (1) grupigas tiujn terminojn inter la tielnomataj „realaĵoj“ aŭ inter senekvivalenta leksiko.

„Realaĵoj“ estas specifaj aperoj de la socia (ekonomia, politika, kultura, spirita) vivo de historie formiĝinta komunikantaro, kiuj en alia komunikantaro aŭ mankas aŭ enhave diferencas. (Ekzemple germane: Stammtisch, Haushaltstag, Jugendweihe).

Dum tradukado en Esperanton tiuj realaĵoj ludas apartan rolon, ĉar la celata komunikantaro ne estas homogena historie formiĝinta socio sed internacia forumo kun plej diversa socikultura fono. La traduko do estu maksimume trafa por esti internacie komprenebla.

Ekzistas pluraj eblecoj „traduki“ realaĵojn. Preciza 1 : 1-traduko ne eblas, ĝuste pro la manko de ekvivalento en la celata komunikantaro.

Tre ofte tradukistoj elektas „pruntepreninta leksemon“, nacilingvan vorton adaptitan al Esperanto, ekzemple *saŭrkraŭto, samovaro sputniko.* Tiuj vortoj al eksterlandano ofertas nenian komprenhelpon. Bezonatas krominformoj (krampe, piednote) aŭ kunteksto. En sciencaj verkoj pruntepreniteaj leksemoj estas relative abundaj pro la parte tre internacia fakterminaro. Multaj scienculoj regas plurajn lingvojn aŭ malkodas la esprimon helpe de kunteksto. (Ekzemple *entimologio, acido, biogenezo ktp.)* En beletraj kaj ĵurnalistaj publikaĵoj tradukistoj preferu la priskribon aŭ klarigan difinon laŭ principo de sufiĉo kaj neceso. (Ekzemple „plantprodukta kooperativo“ estas lingve pli ekonomia ol „kooperativa departemento pri plantproduktado“.)

Plej ofte por sama realaĵo ekzistas pluraj tradukoj paralele. (Ekzemple germ. *Jugendweihe = junulara maturiĝa solenaĵo, junulara konsekra festo, adoleska festo, junulara festo* kaj aliaj). La uzo de unu preferata formo kiel rezulto de la praktika aplikado estas malofte ideala kazo. La proponitaj tradukoj diferenciĝas rilate al kvanto kaj kvalito de perataj informoj kaj estas preferataj aŭ uzataj laŭ la kutimo de lingva reproduktado de aperoj de la objektiva realeco flanke de la ricevinto de la informo. La „praktiko“ ekzemple ankoraŭ ne findecidis pri *„komputero, komputoro, komputilo“*, eĉ *„kalkulilo“*.

La tradukanto (aŭ proponanto) konsideru ankaŭ sociajn kaj politikajn faktorojn. Esperantistoj parolas la saman lingvon sed ne ĉiam saman terminologion. Elektita termino malkaŝas la politikan sintenon aŭ partiecon. Ni memoru la debaton pri la difino de *„koncentrejo“* en PIV, tipa realaĵo el la „III-a regno“!

Aŭtoroj el socialismaj landoj ne imitu la oblikvan lingvouzon de okcidentaj amasmedioj. La Konsilantaro por Reciproka Ekonomia Helpo ne estas *Komekono.* Termino *„partiĉefo“* nur kaŝas nescion de la korekta titolo de la koncerna funkciulo kaj termino *„politpastroj“* ne indas por

grupo de progresivaj katolikaj pastroj. Ni ne uzu „*finnlandigon*“ por desegni aktivan agadon en la senco de la Helsinki-konferenco.

La elekto de termino dependas krome de diversaj pluraj faktoroj kiel sfero de komunikado, celo de komunikado, intencata stila nivelo.

Inter samnacianoj pruntepreníta nacilingva leksemo estas certe komprenata (ekz. ruse „*novatoro*“, laŭ Bokarev, E-R slovar 1974), sed en internacia rondo bezonatas difina klarigo.

Ekzemple „Kulturligo de GDR“ ne aŭtomate kompreniĝas kiel tegmenta organizo ankaŭ de esperantistoj. *Krokodiloj* kaj *talpoj* por neesperantistoj estas nuraj bestoj.

Sen plugi la vastan kampon de neologismoj estu menciate, ke kelkaj tradukistoj uzas nenecesajn, „luksajn“ neologismojn nur por substreki la propran altan kulturan nivelon kaj bonan edukadon, sen konsideri socikulturajn diferencojn inter la komunikantaro aŭ la sferon de komunikado. Kompreneble ili riskas esti ne- aŭ miskomprenataj.

Foje pruntepreníta leksemoj estas intence elektitaj por substreki la devenon de la termino el certa komunikantaro, ekzemple en la broŝuroj el Vjetnamio, aŭ por efiki ŝercon, komikon aŭ pompon, ĉefe en beletraj verkoj.

Laste oni ne pretervidu, ke ankaŭ komfortemo, tempomanko, spertomanko aŭ timo de risko influas la vortelekton de tradukinto.

Bedaŭrinde ne ekzistas recepto kiel traduki realaĵojn. La kontribuo celas atentigi pri la problemaro kaj apelacii al plej zorgema vortelekto fare de tradukantoj kaj terminologoj.

Literaturo:

1. Kutz, W., Fremdsprachen **21** (1977) 4, 254—259 (Berlin)
2. Kutz, W., Fremdsprachen **22** (1978) 1, 7— 13 (Berlin)
3. Lennartz, Michael: Tabelo pri la uzo de socialismaj fakterminoj (man.)

Korekto

Ni petas pardonon pro eraro en n-ro 6/80 de „der esperantist“, p. 142. La distrikta elekto-konferenco en Frankfurt/O. ne okazis dum decembro 1980, sed la 18an de januaro 1981. Elektiĝis kiel prezidantino de DLE s-ino Bärbel Kulisch.

Karl Meier — 80 jara

La 1-an de februaro 1981 sian 80an naskiĝtagon povis festi la dentkuracisto Karl Meier el Berlin. Li multe agadis por Esperanto kaj havas meritojn en la rekonstruo de la Esperanto-movado en GDR.

Josef Vitek — 70 jara

La internacie konata ĉeĥa aktivulo de la Esperanto-movado, longjara prezidinto de ČEA, Josef Vitek, fariĝis la 29an de majo 1981 70 jara. Al li, kiu modeste kaj efike dum sia tuta vivo agadis por Esperanto kaj kiu ĝuas altan respekton ankaŭ en eksterlando, tiel ankaŭ en GDR, venas niaj tre koraj gratuloj. Multaj GDR-esperantistoj partoprenis diversajn pacrenkontiĝojn en Melnik, organizitajn de li: Ni deziras al li ankoraŭ multajn sanajn kaj feliĉoplenajn jarojn.

József Horváth: La unua kosmonaŭto kaj la Internacia Lingvo — Konversacio kun Bertalan Farkas

(La intervjuanto estis klaskamarado de Bertalan Farkas en la lernejo de aviadist-oficiroj. Ili lernis kune ankaŭ en Sovetunio.)
Inter Bertalan Farkas kaj Esperanto ekzistas malnovaj kontaktoj. Li komencis lerni la Internacian Lingvon kiam li estis mia samklasano, pro mia iniciato. Li sukcesis en la ekzameno. Poste, en Sovetunio, dum la malfacilaj ekzercadoj preparantaj por la flugo en la kosma spaco, li ne havis okazon kaj tempon por riĉigi sian scion. Sed nun, denove hejme, Bertalan Farkas havas precizajn planojn pri lingvolernado: krom perfektiĝi en la angla, li volas daŭrigi ankaŭ siajn studojn de Esperanto. Pri la graveco de nia lingvo la unua hungara kosmonaŭto tiel parolas: „Mi konvinkiĝis, ke tiatipa internacia lingvo, kiel Esperanto, estas bezonata. Kiu parolas plurajn lingvojn, povas rekoni, ke E—o estas lingvo tre sukcese prilaborita. Min kaptis la simpleco de Esperanto, la logikeco de ĝia gramatika strukturo. La celo de tiu lingvo estas unu el la plej grandiozaj homaj pensoj." La unua esperantista kosmonaŭto de la mondo havas tre valorajn pensojn ankaŭ pri la lingvaj problemoj de la spacoesplorado.

(Resumo el „Vilag és nyelv" 6/1980)

Scienc-teknika konferenco en Žilina

Post sukcesaj scienc-teknikaj seminarioj okazintaj en Žilina (1978) kaj Usti n. L. (1980) okazos en la tagoj 15. — 18. 8. 1981 en Žilina 1a konferenco pri „Apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko". La organizontoj de la konferenco estas Scienc-teknika sekcio de AESSR kaj Domo de Sindikatoj en Žilina.
Dum la konferenco fakuloj el diversaj landoj pritraktos jenajn temojn:
Tendencoj kaj taskoj en la scienca aplikado de Esperanto, internacia kunlaboro, perspektivoj de fakaj E-aranĝaĵoj, Esperanto en la servo de neesperantista faka publiko.
En apartaj fakaj sekcioj okazos prelegoj pri:

a) lingvonormigo, faka terminologio, vortaristaj laboroj
b) komputiko, matematiko
c) maŝinkonstruado, elektrotekniko, elektroniko
d) kemio, vivomedio
e) konstruado, akvomastrumado
f) aliaj fakoj.

Enkadre de la konferenco okazos paneldiskutoj en unuopaj sekcioj kun la celo de pli intima kunlaboro de fakuloj el diversaj landoj. Oni planas ankaŭ fondi koordinan komisionon por koordinado de sciencteknika agado en unuopaj landoj.
Tuj post la konferenco, en la tagoj 18. — 23. 8. 1981, okazos en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Žilina (Vrátna-valo, Rokaro de Sulov) Turismaj Tagoj. Estas planata ankaŭ Renkontiĝo de E-familioj.
Prelegojn necesas anonci kaj manuskriptojn sendi ĝis fino de marto.

Informojn petu ĉe: Ladislav Hanzel, Hliny 406 A, 010 01 Žilina, ČSSR.

TUSE 80

Ankaŭ ĉijare en Slovakia Paradizo, proksime de la urbo Spiŝská Nová Ves, okazis la tradicia „Turisma Semajno". La entute cent partoprenantoj el ČSSR, Hungario, Bulgario, Pollando, GDR kaj Jugoslavio loĝis sur kampadejo „Čingov-Tatran" (ĉ. 10 km for de Spiŝská Nová Ves) grandparte en modernaj lignaj kabanoj, enhavantaj komunajn banejon kun necesejo, kuirejon kaj grandan loĝĉambron en la teretaĝo kaj supre ĉambretojn kun 2, 3 kaj 4 litoj.
La tre varia programo planis i. a. perpiedajn ekskursojn en la unikan pejzaĝon de Slovakia Paradizo, perbusajn ekskursojn al la Altaj Tatroj, lumbildprelegojn, bivakfajron, dancadon kaj ebligis tiel al ĉiu, senti la etoson inter geesperantistoj, ĝui pitoreskan montaron, ekzerci nian komunan lingvon kaj kontakti kun eksterlandanoj. — Tamen mi devas aldoni, ke grandan parton de la impona beleco de Slovakia Paradizo nur tiu povas rigardi, kiu kapablas marŝi dum 5 ĝis 6 horoj, grimpi sur longaj ŝtupetaroj horizontale aŭ vertikale super aŭ apud torentoj aŭ akvofaloj, ŝovi sin sur mallarĝaj vojetoj laŭ krutaj rokoj k. t. p. Do, oni bezonas sanon, forton kaj taŭgan turistan vestaĵon por tiuj marŝadoj. — Memkompreneble ne ĉiu partoprenanto de TUSE devas entrepreni tiajn streĉajn migradojn, ankaŭ promenadoj en tiu bela protektata naturparko estis planitaj.
Entute tiu aranĝaĵo laŭ mia opinio estas rekomendinda por naturamantoj kaj la vojaĝo tien estas relative komforta por civitanoj el GDR, ĉar apartaj vagonoj (i. a. ankaŭ litvagonoj) veturas rekte de Dresden al Košice tra Spiŝská Nová Ves kaj reen. La kampadejon oni povas atingi per regulaj aŭtobusoj, poste estas necese marŝi ĉ. 15 minutojn supren. (Detalojn mi donos al interesuloj.)

G. Hornbogen, 5300 Weimar, Am Schönblick 11.

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (7)

El la vivo de muzikistoj

Foje venis fremda viro en malgrandan urbon. Dum la meso en preĝejo, kiun li ĉeestis, li petis la orgenludiston, ke li permesu al li iom ludi la orgenon. La orgenludisto, kiu iom trotaksis sian muzikarton, ne permesis tion.

Sed la fremdulo denove petis pri ludpermeso. Ĉar la orgenludisto jam ne sciis kiel rifuzi, finfine li permesis tion. Sed je unu kondiĉo: se li ludos false, li estos forpelita el la preĝejo. La stranga fremdulo eksidis al la orgeno, metis siajn fingrojn sur la klavojn kaj aŭdigis tute falsan agordon. La furioza orgenludisto volis lin ĵus forpeli de la orgeno, kiam la fremdulo ekludis belege kaj virtuoze. Post kiam li finis, li forirante dankis al la surprizita kolego.

La meso estis jam longe finita,. sed la orgenludisto ankoraŭ sidis ĉe la orgeno kaj volis solvi la problemon, kial la fremdulo antaŭ sia belega ludo aŭdigis tian falsan agordon. Li serĉis la agordon ĝis li finfine trovis ĝin. Kiam li rigardis la fingrojn, kiuj premis la klavojn, li preskaŭ mutiĝis de surprizo ĉar li legis: b-a-c-h.

La unua koncerto de Händel en Londono tute ne havis sukceson. Tio ege kolerigis ĉefe la amikojn de la komponisto. Händel mem estis sufiĉe trankvila kaj diris:

„Ne ekscitiĝu tiom! En malplena salono sonas mia muziko eĉ pli bone."

Solvo el n-ro 6/80

Ĉu vi scias: 1c; 2b; 3a; 4ĉ; 5a; 6b.

Klarigoj

meso	— Messe;
orgenludisto	— Orgelspieler (orgeno — ludisto) orgeno = Orgel;
trotaksi	— überbewerten (tro - taksi) taksi = bewerten, schätzen;
fremdulo	— Fremder (fremd-ul-o);
ludpermeso	— Spielerlaubnis (ludi - permeso);
rifuzi	— ablehnen, verweigern;
kondiĉo	— Bedingung;
false	— falsch;
klavo	— Taste;
aŭdigi	— hören lassen (aŭd-ig-i) zu Gehör bringen;
agordo	— Akkord;
furioza	— wütend;
virtuoze	— virtuos;
mutiĝi	— verstummen (mut-iĝ-i) muta = stumm;
salono	— Saal Atentu! salo = Salz.

OrSEJT-22

28. 7. — 17. 8. 1980 en Siberia urbo Krasnojarsk (USSR) okazis la 22a Orientsoveta E-junulara tendaro (OrSEJT-22). Ĝin organizis Krasnojarska E-klubo sub la aŭspicio kaj kun subvencioj de Krasnojarska urba kaj regiona komitatoj de komsomolo kaj urba Kulturpalaco. En la programo de la tendaro estis jam tradiciiĝintaj E-universitato, paroligaj kursoj, seminarioj de E-aktivuloj kaj instruistoj, belartaj kaj sportaj konkursoj. Granda atento estis dediĉita al porpaca kaj internaciisma laboroj de E-kluboj. La partoprenintoj rakontis pri organizado de MEM-sekcioj en sovetiaj respublikoj (Armenio, Uzbekio k. a.), kunlaboro de E-kluboj kun lokaj pacdefendaj komitatoj (Poltavo, Leningrado, Donecko k. a.), okazigo de porpacaj ekspozicioj kaj prelegoj (Rostov-Don, Samarkando, Tjumeno, Krasnojarsko k. a.). Krome la SEJT-anoj organizis „subotnikon“[1]), kiun partoprenis ĉ. 200 tendaranoj el 54 loĝlokoj de USSR kaj kies plena profito estis transdonita al la Sovetia Pacfonduso. La subotniko finiĝis per amasa mitingo, en kiu la partoprenantoj omaĝis la 35an datrevenon de Hirošima-Nagasaki kaj akceptis la suban alvokon al la Esperantistaro de la tuta mondo:

Ni, partoprenantoj de la 22a esperantista junulara tendaro de Siberio kaj Malproksima Oriento, estas maltrankviligitaj pri komplikiĝo de la internacia situacio, kaŭzita de aventuraj agoj de la usona Carter-administracio. Ni bone scias, kio okazis antaŭ 35 jaroj en Hirošima kaj Nagasaki, kaj alvokas esperantistojn de la tuta mondo firme elpaŝi kontraŭ renovigo de la vetarmado. Ni ne permesu ripetiĝon de la tragedio de Hirošima kaj Nagasaki! Ne al neŭtrona bombo![2])

[1]) „subotniko“ estas senpaga libervola labortago

[2]) Noto de la redakcio. La organizintoj de la tendaro sendis al „der esperantist“ liston de 169 subskriboj kontraŭ la neŭtrona bombo.

SELKO-80

Aranĝita en la plej bela parto de la Malaltaj Tatroj en Slovaka Paradizo, la dusemajnaj intensivaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj du grupoj de progresintoj finiĝis tre sukcese. Inter pli ol 100 partoprenintoj el 7 socialismaj landoj kaj Anglio ankaŭ troviĝis 20 esperantistoj el GDR.

Ne uzante la naciajn lingvojn, eĉ la komencantoj jam povis post kelkaj tagoj raporti pri siaj travivaĵoj en SELKO kaj pri siaj gepatraj landoj. Apartan dankon al la instruisto por la komencantoj, s-ro Rybin, kiu ĉiam interese kaj humore peris la instrumaterialon. Dum la semajnfinoj kaj posttagmeze oni aŭtobuse aŭ piede ekskursis al kanjonoj, akvofaloj kaj ekgrimpis montopintojn. Ankaŭ apartenis al la programo vizito de muzeoj en kasteloj kaj de glacigroto. Dum la adiaŭa vespero la plej multaj povis akcepti diplomojn.

Tute neforgeseblaj travivaĵoj kaj granda gajno por la lingvoscio. Koran dankon al la organizintoj de SELKO-80!

Kurt Heeg kaj edzino

TEJO-delegacio ĉe IUS

Komence de septembro reprezentantoj de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo vizitis en Prago la sidejon de Internacia Unuiĝo de Studentoj. La TEJO-reprezentantoj, András Lukács kaj Sándor Revesz pasigis du tagojn tie, konatiĝante kun la agado de IUS kaj konatiĝante la agadon de TEJO al IUS-anoj.

IUS estas granda mondorganizaĵo, ĝi unuigas la naciajn studentajn organizaĵojn de la plimulto da landoj. Ĝia centra sidejo estas moderna sepetaĝa konstruaĵo, kie konstante laboras pli ol cent personoj.

La TEJO-delegacio estis akceptata far la prezidanto de IUS, Miroslav Stepan kaj far tri vicprezidantoj: Aleksandr Jarikov (ĉefo de la sekcio pri rilatoj kun internaciaj organizoj), Dimitar Karamanfilov (ĉefo de la sekcio pri gazetaro kaj informado) kaj Ravane Kone (ĉefo de la sekcio pri la demokratiigo de edukado). Ili ĉiuj esprimis ege favoran opinion pri TEJO kaj pri Esperanto kaj konfirmis la pretecon de IUS evoluigi kaj fortigi la kunlaboron inter IUS kaj TEJO.

Al la sukceso de la vizito multege kontribuis hungara reprezentanto ĉe IUS, kunlaboranto de la sekcio pri gazetaro kaj informado, Károly György. Inter la TEJO-delegacio kaj la IUS-estraro estis interkonsentitaj ankaŭ pluraj konkretaĵoj, i. a. pri la reciproka interŝanĝo de informoj. La IUS-periodaĵoj ekz. pretas aperigi informojn pri la monda lingva problemo, pri Esperanto kaj pri TEJO (kompreneble estas dezirate, ke tiuj informoj rilatu iamaniere al la studentaro). Ĉiuj esperantistoj estas petataj sendi tiaspecajn informaĵojn kaj artikolojn — laŭeble en la angla, franca aŭ hispana lingvoj — al: Hungara Esperanto-Junularo, Budapest, Pf. 193, H-1368, kiu en la nomo de TEJO plusendos ilin al la gazetoj de IUS.

(Budapeŝta Informilo 11/80)

Festivalo en Opava

Kadre de la 23a kultursemajno „Bezruča Opava“ okazis la IVa Esperantista Kultura Festivalo en Opava, Čehoslovakio. De 12a ĝis 14a de septembro 1980 renkontiĝis geesperantistoj el Čehoslovakio kaj Pollando kaj Bulgario. Invitita de CEA partoprenis ankaŭ dupersona delegacio el GDR. De Centra Laborrondo Esperanto de GDR ĉeestis ĝia membro Hans-Jürg Kelpin, prezidanto de DLE Erfurt, kaj Ruth Schonert el la sekretariejo de CLE en Berlin.

Opava estas la patra urbo de Petr Bezruč, konata ĉeha kaj esperanta poeto, kiu skribis „Silezian Kanton“.

La festivalo enhavis multajn artajn kaj muzikajn programerojn, i. a. de ensemblo de antikva kanto el Bydgoszcz, Pollando. Dum la renkontiĝo la festivalanoj ekskursis al monumento de la militoperacio Ostrava, kie la faŝismaj armeanoj estis venkitaj de sovetaj kaj ĉehoslovakaj soldatoj, kies viktimojn la partoprenantoj omaĝis.

En la festkunsido salutis la oficialaj reprezentantoj de Pollando kaj de Germana Demokratia Respubliko la ĉeestantojn.

Troviĝis en la festivala programo ankaŭ nova politika minidramo de la aktorino Eva Seemanova „Ĉerande de l'abismo“, verkita de Valdemar Vinař, kiu temis pri grandaj mondproblemoj kiel batalo kontraŭ milito kaj por paco, por tutmonda malarmado, por forigo de malsato k. t. p.

La festivalo sukcesis kaj donis al ĉiuj partoprenintoj neforgeseblajn travivaĵojn.

HJK

3. IMEK en Bulgario

La Medicina Sekcio de la Bulgara Esperantista Asocio akceptis la taskon organizi la 3an Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon (3a IMEK) en urbo Ruse. La 3a IMEK okazos inter la 15a kaj 19a de julio 1981.

La Konferencon rajtos partopreni kuracistoj, farmaciistoj, veterinaroj kaj aliaj medicinaj faklaboruloj. La organizantoj antaŭvidas fakajn prelegojn, vizitojn al medicinaj institutoj, ekskursoj kaj aliajn kulturajn programojn.

Detalajn informojn kaj aliĝilojn oni povas peti ĉe la landaj delegitoj de UMEA. Medicinistoj el GDR petu la informojn de d-ro Giso Brosche, 7981 Rückersdorf.

Esperanto-Kursejo en Varna 1981

Monato aprilo	1. — 14.	partoprenkotizo	154	levoj	
	16. — 29.	partoprenkotizo	154	levoj	
Monato majo	3. — 16.	partoprenkotizo	182	levoj	
	17. — 30.	partoprenkotizo	182	levoj	
Monato junio	1. — 14.	partoprenkotizo	210	levoj	
	16. — 29.	partoprenkotizo	210	levoj	
Monato julio	1. — 14.	partoprenkotizo	168	levoj	gelernantoj 11—14 aĝaj
	16. — 29.	partoprenkotzio.	168	levoj	gelernantoj 15—18 aĝaj
Monato aŭgusto	1. — 14.	partoprenkotizo	168	levoj	gestudentoj
	16. — 30.	partoprenkotizo	200	levoj	geinstruistoj
Monato septembro	1. — 14.	partoprenkotizo	210	levoj	
	16. — 29.	partoprenkotizo	210	levoj	
Monato oktobro	1. — 14.	partoprenkotizo	182	levoj	
	16. — 29.	partoprenkotizo	182	levoj	
Monato novembro	1. — 14.	partoprenkotizo	154	levoj	
	16. — 29.	partoprenkotizo	154	levoj	
Monato decembro	1. — 14.	partoprenkotizo	154	levoj	
	15. — 29.	partoprenkotizo	154	levoj	
Mon. dec. 81, 29. — mon. jan. 82, 2.		partoprenkotizo	100	levoj	novjara balo

La programo inkluzivas ĉiutagajn diversgradajn kursojn, ĉiam de la 8a ĝis 11a horo. Posttagmeze estas turisma programo, inkluzive banado. Aŭtune kaj vintre la banado okazos en kovritaj basenoj kun natura varma akvo.

Aliĝilojn oni postulu de la BEA-filio en Varna, str. Opalćenska 23.

13a plenkunsido de CLE

La 12an kaj 13an de decembro 1980 en Potsdam la membroj de Centra Laborrondo Esperanto kunvenis al sia 13a plenkunsido. Elstaris el la riĉa tagordo la raporto de Hans Heinel pri la internacia politika situacio kaj la raporto de Linde Knöschke pri la sociologia strukturo de la Esperanto-movado en GDR. Oni krome akceptis la laborplanon de CLE por 1981, traktis la IIIan Centran Konferencon kaj skizis la fakan agadon de la fakgrupoj medicina, fervojista, pedagogia kaj interlingvistika.

Junulara seminario

De la 9a ĝis 13a de decembro 1980 en Miersdorf ĉe Zeuthen (Berlin) okazis seminario por junaj aktivuloj de la Esperanto-grupoj de KL de GDR. Prelegis reprezentanto de la Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo, plue d-ro Detlev Blanke kaj Michael Lennartz. Partoprenis entute 24 personoj el diversaj distriktoj.

Intensa kurso

La 13an de oktobro 1980 renkontiĝis en la malgranda vilaĝo Golm, subdistrikto Potsdam, 33 geesperantistoj el la tuta respubliko por perfektigi siajn Esp.-lingvosciojn. DLE Potsdam organizis la kurson kaj bone preparis ĉiujn kondiĉojn por sukcesplena realigo.
La kurson gvidis la konata hungara Esperanto-instruistino Zsuzsa Barcsay el Budapesto, kiu garantiis bonan nivelon. Multaj partoprenantoj devis konstati, ke iliaj prononcoj, speciale de la literoj „s", „c", „ĉ", „ĝ" kaj „ĵ" ne konformis al la internaciaj normoj.
Dum tre interesa duhora prelego D-ro Blanke informis pri la situacio de la internacia Esperanto-movado kaj pri la UEA-kongreso en Stokholmo.
Ekskursoj al la historia memorejo „Cecilienhof", kie en la jaro 1945 estis subskribita la „Potsdama Konvencio", kaj al la „Nova Palaco" en la parko de Sanssouci peris longdaŭrajn impresojn. Bedaŭrinde la malmultaj vesperoj, plenumitaj per lumbildprelegoj, konversacioj k. t. p., tro rapide forpasis.
Finfine ni povis konstati, ke la kurso estis por ĉiuj grava kaj bela travivaĵo.

K. Müller

Distrikta Konferenco en Potsdam

Okaze de la elektado de la nova Distrikta Laborrondo Esperanto en KL de GDR, distrikto Potsdam, renkontiĝis la 20an de septembro 1980 ĉirkaŭ 50 esperantistoj en la gastejo „Elsässer Weinstuben" en Potsdam-Bornstedt.
Sukcesplene forpasis la bone organizita aranĝo. La raporto de la distriktestraro kaj diversaj diskutparoladoj informis pri la laboro dum la lastaj jaroj kaj pri la novaj taskoj de la estonteco. Per la ordeno „Aktivisto de socialisma laboro" estis honorigitaj H. Scheffs kaj K. Müller, kaj per libroj oni premiis pro bona honorofica laboro R. Herr, E. Lindner, B. Raabe, Dr. Schüler, E. Starke, H. Scheffs, D. Stoll, P. Schödl kaj G. Walz.
Nian altestimatan amikon Ludwig Schödl, vicprezidanto de CLE, kiu ne plu kandidatis por DLE Potsdam, la distriktestraro de Kulturligo en Potsdam elektis lin Honora Membro de nia nova DLE. Estis gastoj de nia konferenco sovetaj kaj polaj esperantistinoj. Distrikta kaj gastaj kulturgrupoj beligis la aranĝon. Mallonga posttagmeza ekskurso en la proksima „parko de Sanssouci refreŝigis la partoprenintojn por la vespera dancado. Kun nova forto ni nun komencis solvi la antaŭ ni starantajn taskojn. Centra celo, al kiu ni strebas estas, kiel postulis la slogano de nia konferenco „Esperanto en servo de la paco"!

K. Müller

Neuauflagen im Enzyklopädie-Verlag

Nach Mitteilung des Verlages Enzyklopädie Leipzig sind für 1981 Neuauflagen der Taschenwörterbücher Esperanto—Deutsch (4. Auflage) und Deutsch—Esperanto (3. Auflage) von Erich-Dieter Krause sowie vom Taschenlehrbuch Esperanto (2. Auflage) von Till Dahlenburg/Peter Liebig zu erwarten. Es wird dringend empfohlen, diesbezüglich mit dem örtlichen Buchhandel Verbindungen aufzunehmen (Vorbestellungen).

„Urania" disputo kun sciencisto

La populare kleriga asocio de GDR „Urania" dum septembro 1980 en Leipzig invitis al interesa vespero. Profesoro d-ro Werner Reinecke de la Karl-Marx-Universitato Leipzig kaj Jürgen Hamann, membro de la prezidio de CLE diskutis kun ĉirkaŭ 70 ĉeestantoj pri la temo de internacia lingvo sub la originale titolo „Cu la amon komputile?". La vespero vere vekis diskutojn kaj disputojn kaj tiel kontribuis al ekkonscio pri la monda lingva problemo kaj al kompreno pri la realaj fortoj kaj eblecoj de Esperanto.

Vortrag über Japan

Japan, Land der Naturschönheiten, Land von Klassenkämpfen, Land des Kampfes gegen die Atombombe,
hierüber spricht auf Wunsch Gen. Ludwig Schödl, stellvertretender Vorsitzender des Zentralen Arbeitskreises Esperanto. Er bietet einen erregenden Dia-Vortrag über Hiroshima mit weiterem Anschauungsmaterial (1 — 1½ Stunden). Lediglich für Übernachtung müßte gesorgt sein. Weitere Unkosten entstehen nicht. Interessenten (Bezirksarbeitskreise und Kreisarbeitsgruppen) wenden sich bitte direkt an Ludwig Schödl (1950 Neuruppin, Rosa-Luxemburg-Straße 37).

Fervojistoj en Schellenberg/Erzgeb.

La Fervojista fakgrupo de Centra Laborrondo Esperanto aranĝis ankaŭ en 1980 la jaran renkontiĝon denove en la sudo de GDR, en fervojista ripozdomo Schellenberg ĉe la piedo de kastelo Augustusburg apud Karl-Marx-Stadt. Partoprenis 15 gekolegoj, parte kun familianoj, kaj krome la du hungaraj kolegoj kaj estraranoj de Fervojista Faksekcio de HEA, d-ro Mihaly Szegedi kaj János Patay. La invititaj ĉeĥoslovakaj gekolegoj bedaŭrinde pro granda eraro rilate al la fiksita dato de nia jarkunveno ne povis ĉeesti, kvankam ili intencis tion.

Kiun programon ni majstris?

Alveninte vendrede la 7an de novembro, nia oficiala laboro komenciĝis sabate frumatene:

— raporto de la fakgrupa estraro pri lastjara laboro kaj pri la problemoj de la fakgrupo;
— konceptaĵo de estontaj taskoj;
— salutvortoj de la hungaraj kolegoj kaj reciproka transdono de donacoj;
— diskutado pri la raportoj kaj proponoj por la estonta laboro:
  • proponoj de kolego H. Hoffmann „por unuecaj laŭtparolilaj anoncoj en internacia pasaĝera trafiko“ (vidu ankaŭ FN n-ro 2)
  • konceptaĵoj pri la plivastigo de kunlaborantoj por „FN“ kaj pri la plibonigo de l'enhavo de la informilo mem (de kolego H. Jasmann).

Post la tagmanĝo ni ekskursis al la konata kastelo Augustusburg. Tie ni partoprenis la gvidadon tra la diversaj konstruaĵoj de la kastelo, poste ni veturis per funikularo al Erdmannsdorf kaj reen. Reveninte de nia ekskurso ni aŭdis du fakprelegojn:

— de kolego Heinz Hoffmann: „Garantiebloj pri libera trako kaj nova formo de trajnfina signalilo“
— de kolego Achim Meinel: „La elektrigo de fervojo, precipe ĉe DR (Deutsche Reichsbahn).

La reston de la vespero ni babiladis, fakdiskutis, amuzis nin per muziko kaj trinkaĵoj.

Dimanĉe matene ni denove tre utile pritraktis fakajn labortemojn, precipe la problemon de fakterminara laboro. Kolego Horst Theurich prezentis ĉiflanke siajn interesajn ideojn pri tiu ĉi nepre necesa laboro kaj la hungaraj kolegoj raportis pri sia kaj la internacia fakterminara laboro. Ĉiloke mi povas dankeme konstati, ke niaj MAV-kolegoj kontribuis al la sukceso de nia kunveno per bonaj, valoraj konsiloj kaj ke ni deziras, la komencitan kunlaboron plue evoluigi kaj plivastigi.

Post la pritrakto de diversaj organizaj demandoj estis fermita nia ĉi-jara konferenco. Resumante la tutan renkontiĝon (iu nomis ĝin kvazaŭ severa laborkunsido) povis la prezidanto de nia fakgrupo konstati ĝian tre sukcesan trapason kaj alvokis ĉiujn membrojn de la fervojista fakgrupo ankaŭ la ne-ĉeestintajn jam nun prepari la sekvontjaran renkontiĝon kaj la tutan jaron aktive kunlabori konforme al la propraj specifaj eblecoj.

Ĝojige oni povas konstati, ke ni plejparte prelegis kaj diskutis esperantlingve, por la komencantoj resumante germanlingve.

Achim Meinel

GDR-Paco 1980

Jus aperis la ĉiujara bulteno de la GDR-MEM-Sekcio por 1980. Ĉijara ĝi eldoniĝis, pro teknikaj kaŭzoj, kelkajn monatojn pli malfrue.

La numero estas rekte ricevebla ĉe CLE (—,50 pfenigoj) kaj liverata laŭ kutima sistemo al la abonantoj de la oficiala serio de „Paco“.

Jen el la enhavo: NATO sen masko / Nukleaj sekretaĵoj / Alvoko de MPK / . . . kaj ĉu la murdintoj ne kulpas? (problemoj de vjetnamaj rifuĝintoj) / Afganio kaj la homaj rajtoj / La „Hitlerjungen“ el Frankfurt-Main / 35 jaroj post liberigo de la germana popolo / La sekreto de „Enigma“ / parto el libro de N. Andrianova pri Eroŝenko / 3 komparaj tradukoj de Faŭsto-scenaĵoj / Literaturaĵoj de M. Arnold, V. Tihonov, B. Jentzsch, N. Andrianova, E. v. Bauersfeld, L. Renn, A. Logvin, K. Tucholsky, H. Heine, L. Thoma, E. Weinert, W. Bredel, B. Laskin, A. S. Puŝkin, J. W. v. Goethe / recenzoj pri 13 libroj / kaj jenaj fakaj artikoloj: — D. Blanke, Ludwig Renn — la esperantisto, — prof. d-ro Frank Häusler, La sinteno de J. Baudouin de Courtenay al la problemo de mondaj helplingvoj, — Canko Murgin, L. Zamenhof dum la revolucio en Rusio (1905 — 1907), kaj koresponddeziroj el 7 landoj.

Konstantin Miĥailoviĉ Gusev 1916 — 1980

Mortis post longa malsano la 9an de novembro 1980 la internacie konata esperantisto-poeto Konstantin Gusev. Multaj tradukoj de Lermontov, Jesenin, Jevtuŝenko kaj aliaj rusaj kaj sovetaj poetoj kaj originalaj poemoj venis el lia plumo. Li ankaŭ aktivis en MEM. CLE kaj ĉiuj amikoj de K. M. Gusev funebras kaj sincere kondolencas al la soveta esperantistaro.

Berichtigungsblatt zum „Begleitmaterial zum Selbstunterricht“, ZAK Esperanto. Berlin 1979

Seite	Zeile	gedruckt	muß heißen
2	3. v. u.	Wir wünschen ihnen	Wir wünschen Ihnen
6	9. v. u.	Buchstaben, und	Buchstaben und
9	12.	Zusammensetzungen (Kennzeichen:	Zusammensetzungen / Kennzeichen:
12	5.	forkoj, kaj	forkoj kaj
14	14.	du montajo	du monatoj
21	2. v. u.	„Wo?“,) Sie	„Wo?“), sie
22	20.	сеья	себя
	22.	хорошол	хорошо
24	24.	удратр	удрять
	7. v. u.	gestatten.	gestattet.
28	16.	Touristen.“	Touristen.“)
31	12. v. u.	dum via fario?	dum viaj ferioj?
32	6. v. u.	окончфившая	окончившая
34	5. v. u.	Kunstsprache	Kunstsprachen
35	13./14.	Neufassung: — lia sonĝo estas interrompata = „sein Traum wird unterbrochen.“ Hier liegt in „interrompata“ das Partizip Präsens Passiv vor (=„unterbrochen werdend“). In Verbindung mit den Präsensformen von „esti“ entsteht das Präsens Passiv; dieses bezeichnet . . . (weiter wie ausgedruckt)	
36	20.	Präsensform plus	Präsensform von „esti“ plus
37	6.	Nr. 1:	Nr. 10:
38	12.	Inter Lingua	Interlingua
	19. v. u.	estas malfermita	estos malfermita
39	8.	римур н	римур и
41	22.	lumbildoni . . . relegon	lumbildparoladon . . . oni
43	5. v. u.	sie ist sehr	sie war sehr
44	13.	Nobelpreistägerin:	Nobelpreisträgerin
47	10. v. u.	Ciolkovski	Ciolkovskij
45	2.	dek naŭajarcento	deknaŭa jarcento
50	4.	registaaro renkontigas	registaro renkontiĝas
59	13. v. u.	das Wort	den Wunsch

Fakgrupo tradukistoj

La 29an de novembro 1980 en Berlin kreiĝis Fakgrupo de tradukistoj ĉe CLE. Partoprenis 12 esperantistoj. Post longa kaj tre interesa diskuto oni elstarigis kiel taskojn por la nova fakgrupo la jenajn:

— faka kvalifikado
— interŝanĝo de spertoj
— organizado kaj pritakso de publikaj tradukkonkursoj
— kunordigado kaj gvidado de tradukistaj grupoj en la distriktoj
— ellaborado de helpiloj por tradukistoj
— diskutado de terminoj, aparte el la socipolitiko
— konsilado por verkado de manuskriptoj
— eldonado de „Tradukista Informilo“
— publikigo de tradukaĵoj kaj originalaĵoj.

La „Tradukista Informilo“ (multobligita letero) jam aperis.

Ĉiuj interesitoj el GDR pri la kunlaboro en la Fakgrupo bv. rekte skribi al Centra Laborrondo.

Ni kore gratulas

— al Ernst Lindner el Jüterbog, kiu ricevis la Patrolandan Meritordenon,
— al geedzoj Gertrud kaj Werner Esefeld el Waltershausen pro ora geedziĝa jubileo.

Konferenz junger Esperantisten in Neubrandenburg

Man könnte mit wenigen nüchternen Fakten darüber berichten:

Fünfte Bezirksjugendkonferenz der Esperantisten am 18. und 19. November 1980 in Neubrandenburg mit über 40 Teilnehmern und einem reichhaltigen Programm. Weit wichtiger ist aber der Hintergrund, auf dem dieses Treffen junger Esperantisten stattfand.

Derartige Veranstaltungen finden im Bezirk Neubrandenburg jedes Jahr statt. Ich habe bereits zum dritten Mal teilgenommen und konnte daher das qualitative und quantitative Wachsen dieser Konferenzen erleben. 1978 waren es wenig mehr als zehn Teilnehmer. 1979 konnte man schon die doppelte Teilnehmerzahl verzeichnen. Nun traf man sich in einem großen, modernen Salon des Berufsausbildungszentrums in der Oststadt. Die hohe Beteiligung wurde durch einen Kunstgriff erreicht (warum auch nicht!): einige „Frühergeborene" sowie Gäste aus der polnischen Partnerstadt Koszalin gehörten zu den Teilnehmern. Letztere machten es notwendig, daß die gesamte Konferenz zweisprachig ablief. Die Übersetzung wurde von den jungen Esperantisten des Nordbezirkes aus eigener Kraft bewerkstelligt. Elke Valtin, Vorsitzende des Jugendaktivs, und Dirk Eßling als ihr Stellvertreter lösten nicht nur diese Aufgabe gut, sondern leiteten die gesamte Veranstaltung selbständig und souverän. Überhaupt scheint mir das „Geheimnis" des Erfolgs der Neubrandenburger Jugendarbeit im Vorhandensein einer funktionierenden Jugendleitung und ihrer relativ selbständigen (aber nicht unkontrollierten) Arbeit zu liegen.

Das Programm entsprach der Tradition: Annahme eines Arbeitsplanes für 1981, Eindrücke vom internationalen Jugendkongreß in Finnland, vom Čebalta Esperantista Printempo und vom SEFT 80, Lieder der polnischen Freunde. Zum Sonntag gab es eine Stadtbesichtigung. Was könnte man für die nächste Konferenz berücksichtigen? Die Teilnehmer sollten doch auch ihre Freunde oder Freundinnen mitbringen.

M. Lennartz

„La flago el Krasny Sulin"

Sub tiu titolo la Distrikta Laborrondo Esperanto en Schwerin eldonis 1979 broŝureton (31 p.) pri la sorto de ruĝa flago, kiun proletoj el la urala urbo Krasny Sulin donacis kiel signon de konkursvenko al proletoj en Güstrow en la jaro 1932. La konkurson inter proletaj kolektivoj de regionoj de Mecklenburg (norda Germanio) kaj laboristoj de sekcioj de granda ŝtatuzino en Krasny Sulin peradis siatempe la laborista esperantisto Rudi Graetz pere de Esperanto. La historion de la flago priskribis 1967 Ursula Gärber en artikola serio en „Schweriner Volkszeitung". La materialon tradukis Hans Buth. La broŝureton oni povas mendi ĉe Hans Diedrich (2700 Schwerin, Von Thünenstraße 42).

(Pri la temo ankaŭ komparu D. Blanke „Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj . . ." en: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado [Budapest 1978], p. 75 kaj H. Mühlstädt, Hans Warnke — ein Kommunist. Rostock 1975, p. 102—105 [en tiu libro ankaŭ troviĝas foto pri la esperantlingva originala leterkontrakto inter la partneroj el Germanio kaj Sovetunio].)

Letervesperoj — efikaj kaj interesaj

La Esperanto-grupo Rostock organizis 1980 en la kadro de la instruado en la Popola Altlernejo Rostock Esperanto-kurson por komencantoj. Ni ĉiuj bone scias, se ni ne sukcesus certigi sukcestravivaĵon al la junaj, novaj esperantistoj, ili baldaŭ dubas pri la internacia taŭgeco de Esperanto. La penoj dum la studado kaj instruado estis vanaj.
Pro tio ni organizis „Letervesperon", al kiu venis entute 224 leteroj el jenaj landoj:

Bulgario	= 104	Belgio	= 1
ČSSR	= 18	Finnlando	= 2
Nederlando	= 1	Pollando	= 8
Hungario	= 11	Sovetunio	= 79

Inter ili ankaŭ troviĝis kelkaj lernantoj, kiuj intencis korespondi kun niaj komencantoj. Tamen, por niaj lernantoj la ampleksa respondo al multaj leteroj ne estas solvebla. Do, ni alvokis ĉiujn klubanojn por helpi respondi la ricevitajn leterojn, kiuj ne trovis konvenan korespondanton. Če tio ni konsciis, ke en la hodiaŭa komplika internacia situacio ni devas per la korespondado klarigi ankaŭ nian starpunkton pri la internacia situacio laŭ nia vidpunkto, same kiel montris la laboristaj esperantistoj dum la 20aj jaroj, kiam la burĝaj reĝimoj kalumniis la konstruadon en Sovetunio.

Kun entuziasmo ĉiuj faris el la letervespero „Internacian Vesperon".

Werner Plate

Helpu al KEA

La kubaj esperantistoj organizas diversajn kursojn kaj tre volonte akceptas materialon en Esperanto, ĉu novan, ĉu malnovan. Ĉion ili volonte utiligas en siaj kursoj aŭ kiel legaĵoj, donacoj k. t. p. Se vi volas helpi al niaj kubaj kamaradoj, sendu ĉion al Kuba Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 314, Havano 1, Kubo.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Britio

Frank C. Danson, 7, Infield Park, Barrow-in-Furness, **Cumbria,** LA 13, 9 JL, dez. kor.

Hispanio

Junulo, 21 j., dez. kor. kun gejunuloj p. ĉ. t., Joaquin Barrios Lucas, COE 22, **Huelva**

Jugoslavio

Rudolf Žoldoŝ, **24000 Bubotica,** Iv. Milankovića 29/B., dez. kor. pri vojaĝoj, muziko, turismo, kol. bk

Namibio

Junulo, 19 j., dez. kor., kol. pm: Ottmar von Holtz, poŝtfako 11086, **9000 Klein-Windhoek**

GDR

Metilernantino, 17 j., dez. kor.: Kerstin Willmann, **1800 Brandenburg,** Georg-Dimitroff-Allee 5

Lernantino, 14 j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm: Katrin Wilfer, Jaspisstraße 14 b, **8250 Meissen**

Käthe Mönch, **4020 Halle,** Beethovenstr. 10, (63 j.) dez. kor. tutmonde

Bulgario

Fraŭlino, lernantino, 17 j., dez. kor. tutmonde: Neli Vezenkova, Komplekso „Friedrich Engels", bl. 7, vh. „B", ap. 29, **5400 Sevlievo**

Profesorino, 30 j., dez. kor. k. gesamideanoj el GDR pri literaturo, filmoj, turismo, modo k. a.: Tanja Ruseva, str. Rahovec 5, vh. 2, et. 6, **5180 Gorna Orehovica**

Kemiisto, 24 j., dez. kor. k. gesamideanoj el GDR pri sporto, turismo, literaturo: Petâr Nikolaev Mihalev, **5282 Carevec,** V. Târnovski

Ĉeĥoslovakio

Štefan Špigúth, **038 01 Martin-Priekopa,** direktoro de la Baza Lernejo, kol. ABC-librojn (lernolibroj por unuaklasanoj) el la tuta mondo

Hungario

Komencantino, 23 j., dez kor. tutmonde pri belartoj, kol. bk, pm: Klára Vadász, **5602 Békéscsaba,** Tavácsköztársasag ut. 58

Infanvartistino, 21 j., dez. kor. tutmonde, Éva Sipos, **6900 Makó,** Nagycsillag ut. 53

László Kamény, **1072 Budapest VII,** Rákoczi u. 8/a, III/21, (25 j.), dez. kor. k. junulino pri muziko

Komencanto, 24 j., dez. kor. k. gesamideanoj el Schwerin: Gábor Mezei, **2626 Nagymaros,** Selmeczbánya u. 6

Rumanio

Gazetisto k. poeto dez. kor. tutmonde pri literaturo, pri la problemoj de la gazetaraj tekniko k. teorio: Vasile Poenaru, str. 13 Decembrie, Nr. 5, sect. 1, **70 116 Bucuresti**

Studento, 25 j., dez. kor. tutmonde k. gejunuloj pri turismo k. Esperanto: Onet Ionel, **3531 Com. Calatele 156,** Jud. Cluj

Soveta Unio

Pri bredado de rampuloj kaj amfibioj en kondiĉoj de terariumo dez. kor. tutmonde: Aleksej Golovanov, **123 242 Moskvo,** B. Gruzinskaja 1, Zooparko, terarium-sekcio

Esperanto-rondeto de fizika fakultato de Donecka Ŝtata Universitato dez. kor. tutmonde k. gestudentoj kaj instruistoj precipe fizikistoj. Bv. skribi al Oleg Ignatjev, **340 092 Doneck,** ul. Nijnekurganskaja 41, kv. 93

Lingvoinstruisto, 50 j., dez. kor. kun GDR-anoj, precipe el Berlin, kol. pm, bk: Nikolai Vojtenko, **350 018 Krasnodar,** Sormovskaja str. 27–2

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 157